1/99
Januaro-Aprilo
(X-a jaro, Nro. 3)

# AVANCO

Oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio

SPECIALA NUMERO

ENHAVO

| | Paĝoj |
|---|---|
| Energie kaj entuziasme | 3 |
| ESTRARA RAPORTO 1998 | 4 - 18 |
| Malgraŭ ĉio, KEA reprezentita en TAKE... | 18 |
| **SAEST** ***2000*** **(Circulero 1)** | 19 - 20 |

## Estimataj:

Jen la unua eldono 1999 de la Oficiala organo de Kuba Esperanto-Asocio kaj la lasta sub la gvido de tiu ĉi redaktoro kiu okupiĝos pri aliaj aferoj.


Ĉi kaze, AVANCO enhavas la Estraran Raporton 1998, detalplene priskribante la agadon de KEA dum tiu periodo, kun la celo ke vi havu la plej ampleksan bildon pri nia Asocio ĉiukampe.

Krome, ni aldonas la Aliĝilon de nia venontjara Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, SAEST *2000*.

Legu, analizu kaj reagu.

Via redaktoro,

J. Ramón



## NACIA ESTRARO

*Maritza Gutiérrez González
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.

*Juan Ramón Rodríguez Gómez
Ĝen. Sekr. Kontrolas internan agadon. / Historio, Ameriko, **Avanco, La Noktuo kaj Universo.**

*Martha Alonso Gutiérrez
Financoj. / Resp. pri administraj aferoj.

*Alberto García Fumero
Informado. / Hejmpaĝo.

*Pedro Fernández Rodríguez
Kulturo. Zorgas pri artaj k. klerigaj aranĝoj. / Biblioteko.

*Manuel Rodríguez Rábago
Internacia kaj Publikaj Rilatoj.

*Héctor Jiménez Batista
Instruado kaj ILEI-Sekcio.

Komisiitoj
*Roberto Torres Álvarez
Atento al alilandaj e-istoj.
*Juan Lázaro Besada Toledo
Atento al verkistoj.
*Carmen A. Hernández Socarrás
Scienco kaj tekniko.
*Felicia Rose Sola
Libroservo

X-a jaro, nro. 3 (1/99, jan.-apr.) / Aperas 3 foje jare / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 40-1364 kaj 40-4484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@mail.infocom.etecsa.cu / Ĉefredaktoro k. grafika aranĝo: Juan Ramón Rodríguez Gómez / Kunlaboris: Alberto García Fumero / Komputila aranĝo: Roberto Molina Gálvez / Prezo: 1:00 CUP (enl.), 2.00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).

16-a Komitatkunsido kaj 3-a Nacia Kongreso de KEA

# ENERGIE KAJ ENTUZIASME

De la 10-a ĝis la 11-a de marto oni okazigis la 16-an Komitat-kunsidon de KEA, kaj ĉar temas pri elektojaro estis elektita nova estraro (vidu 2-an paĝon). Poste, de la 11-a ĝis la 13-a oni okazigis la III-an Nacian Kongreson de KEA en la Nacia Biblioteko, kio certe kontribuis al propagando kaj diskonigo de niaj celoj al la ekstera mondo. La Kongreson partoprenis ĉirkaŭ 150 homoj, el ili deko da eksterlandanoj; entute, homoj el 8 landoj. Oni ĝuis prelegojn, artan vesperon, aŭkcion, forumon pri la rolo de E-o en la tria jarmilo, ktp. La partoprenantoj havis ankaŭ okazon viziti la monumenton dediĉita al la Nacia Heroo José Martí en la Placo de la Revolucio. Aparte interesaj estis la demonstrado de la ortopedia masaĝo Jumeiño kaj la partopreno de ĉarmaj, entuziasmaj infanoj el diversaj provincoj. La muziko de la guantanamana ensemblo Anĝelo dancigis la tutan kongresanaron dum la Arta kaj Adiaŭa Vesperoj.

## KOMITATAJ INTERKONSENTOJ

1.- Elekti sinjorojn Pedro Fernández kaj Juan Ramón Rodríguez kiel protokolistoj.
2.- Laŭdi la laboron de Alejandro García dum la Kongreso, pro sia granda laboro favora al informado dum la jaro 1998.
3.- Reprodukti la tekston pri ILEI-ekzameno kaj sendi ĝin al filioj.
4.- Laŭdi la laboron de sinjoro Eddy Raats dum la Kongreso pro sia daŭra helpo al la E-movado en Kubo.
5.- Fari kunsidon de kelkaj fakuloj (Carmen A. Hernández, Roberto Torres, Alberto García kaj aliaj estraranoj) por fiksi strategion en rilato kun Scienco kaj Tekniko.
6.- Aprobi la jaran raporton.
7.- Aprobi la bilancon '98.
8.- Aprobi la buĝeton '99.
9.- Elekti Komisionon por la reviziado de la Regularo: Norberto Díaz Guevara, Rafael Cabrera Espinosa, Gonzalo Collantes García, Juan Ramón Rodríguez Gómez kaj Maritza Gutiérrez González.
10.- Elekti Komisionon pri Financaj aferoj: Julio César Tamayo Salas, Edilberto Rodríguez Acán, Pedro Fernández Rodríguez kaj Felicia Rose Sola.
11.- Aprobi redaktoteamon de **Avanco**: Norberto Díaz Guevara, Roberto Cutiño Palau, Gonzalo Collantes García kaj Edilberto Rodríguez Acán.
12.- La provincaj filioj sendos al la NE financan informon ĉiun trian monaton.
13.- Aprobi la Ĉefajn taskojn por la jaro 1999.
14.- La filioj sendos al la NE la lokan jaran laborplanon antaŭ la 30an de aprilo.
15.- La Komitatkunsido de la jaro 2001 okazos en Villa Clara.

# ESTRARA RAPORTO

*Kiam la Asocio alproksimiĝas al sia dudeka datreveno kaj mankas malmultaj horoj por malfermi nian 3-an tutlandan kongreson, ni, naciaj komitatanoj de KEA, kunsidas por mediti kaj analizi la laboron faritan dum 1998. Tre bonvenaj estos la diversaj ideoj kaj opinioj viaj, ĉar nur tiel la kvalito de la movada laboro pliriĉiĝos kaj nia Asocio pli antaŭeniros.*

*De januaro ĝis decembro ni atingis sukceson en niaj pluraj laborsferoj danke al la agado de multaj movadanoj kiuj, preninte grandan kaj malgrandan parton de sia libera tempo, plenumis ĉiaspecajn taskojn. Tiu sindonema kaj sindediĉa sinteno ebligis la disvastigon de nia movado, daŭran informadon al la ekstera publiko kaj al nia esperantistaro, perfektiĝon de nia instrua kaj kultura agadoj, de niaj publikaj kaj internaciaj rilatoj, de financoj, kaj la okazigon de pluraj aranĝoj kaj eventoj, inter kiuj pli elstaras la 1-a Infana Renkontiĝo en Guantánamo, la 19-a datreveno de la Asocio, Nacia Renkontiĝo en Cienfuegos, Seminario por Instruistoj, partopreno en internaciaj eventoj kaj la 2-a Kuba Kultura E-Festivalo okazinta fine de novembro en Stgo. de Cuba.*

*Mispaŝoj, eraroj, miskomprenoj kaj malsukcesoj ankaŭ estis. Estas nia devo akcepti, kritiki kaj eviti ilin en la estonteco tial ke nia agado pli brilu kaj sekve nia Asocio gajnu pli da prestiĝo.*

*La nuntempo postulas en kiu ajn laboro, homojn pli saĝajn, pli inteligentajn, pli fidindajn kaj pli kompetentajn. Ni agadu forte kaj respondece por ke ĉiuj niaj aktivuloj, estraranoj kaj movadanoj atingu tiajn kvalitojn bezonatajn por impulsi la kuban zamenhofan ĉaron.*

## 1. INFORMADO

Jam dum kelkaj jaroj nia informa fako restas kiel prioritato konstanta por plenumi gravan celon asocian, sendube la disvastigon. La jaro 98 estis markita de la datreveno 19-a de nia ekzisto kaj tiel estiĝis diversaj planoj kiuj fruktedonis pere de rimarkinda informa laboro. Ĉirkaŭ la datreveno, meze de la jaro, kaj la Kultura Festivalo (jam en la jarfino) ni sukcesis allogi la nacian publikon per la nacia televidsistemo, kiu sendube nialande atingas kelkajn milionojn da personoj. Tiu ĉi estis unu el la plej frapaj atingoj de la jaro 98 en la informa fako kiu influis en aliaj aspektoj de la asocia laboro ligitaj al la publiko, kiel la varbado de novaj lernantoj.

**1.1.** La regula informado estis ja kontentiga pro la menciitaj kialoj. Oni entreprenis diversajn demarŝojn rilate propagandon per diversaj amasmedioj, radio, ĵurnaloj kaj televido kun la valora helpo de Alejandro García, kio alportis tre bonajn rezultojn. Regula informado efektiviĝis per naciaj kaj lokaj radiostacioj: **Progreso**, **Reloj**, **Rebelde**, **Metropolitana**, **Ciudad**, **Enciclopdia**, **Radio Havano**, **Guamá** (Pinar del Rio), **CMHW** (Villa clara), **Morón** (Ciego de Avila), **Cadena Agramonte** (Camagüey), **Angulo** (Holguín), **Bayamo** (Granma), **CMKC** (Santiago de Cuba), en Guantánamo kaj aliaj. En la nacia televido estis prezentita duonhora programo dediĉita al Esperanto ĉirkaŭ la aranĝoj de la 19-a datreveno de la Asocio kaj okaze de la Festivalo ni demarŝis por televida reklamo oficiale kontraktita kaj per tio dum pli ol semajno aperis regule reklamo pri la evento kaj pri Eo. Oni ankaŭ laboris en la reliefigo de grafika propagando sed la rezulto ne estis kiel atendite. Nur en apartaj

kazoj estis brila, nome dum la Kultura Festivalo okazinta en Stgo. de Cuba per afiŝoj, ktp; ankaŭ estis bona atingo la pretigo kaj ekkomenco de itinera ekspozicio sub la nomo "Esperanto: lingvo, kulturo, movado", kiun oni prezentis dum junio en la Nacia Biblioteko kaj poste en Bayamo, Stgo. de Cuba, Guantánamo kaj municipo Contramaestre. Krome, oni sukcesis publikigi en regionaj ĵurnaloj raportojn pri Scienco kaj Tekniko (**el habanero**), pri la E-agado en Navajas, P. Betancourt (**Girón**) kaj serion pri E-o en Camagüey (**Adelante**).

**1.2.** Konsciigi la membraron pri graveco kaj bezono de konstanta persona informa agado estis daŭra laboro entreprenita ankaŭ dum la jaro. Grava parto de tiu ĉi agado estis farita en la diversaj aranĝoj pere de temaj analizoj, prelegoj kaj aliaj. Tiurilate ni devas pli kaj pli emfazi tiel ke niaj homoj ricevu jen en la aranĝoj jen en klasoĉambroj regulan informadon pri tiklaj temoj rilate al la lingvo kaj al la evoluo de la nacia kaj internacia E-komunumo.

**1.3.** Rilate la asociajn organojn ni sukcesis plenumi tiun ĉi agadon, sed ofte tro pene estis farita kaj ne mankis malfruoj jen eldona jen en la distribuado, kio igis nin pridiskuti la bezonatan kunlaboron kaj koherecon en ĉiu paŝo por atingi pli akuratan eldonon kaj distribuadon. Ni insistas pri la bezono plibonigi la distribuan proceduron tiel ke la celo de la bulteno ne plenumiĝas ĝis la fina momento kiam la esperantistoj tralegas ĝin. En aliaj regionoj ankaŭ ekestis problemoj por eldono de aliaj bultenoj kiel **Jajabo** (S. Spiritus), kiu neregule povis aperi pro diversaj eldonmalfacilaĵoj. Aperis la bulteno **La Famo** (Guantánamo), **Antaŭen** (Camagüey), kaj **Verda Lumo** (Santo Domingo, Villa Clara).

**1.4.** Kiel tradicie ni havas kiel laboraspekton iel stimuli la esperantistojn kontribui al apero de KEA en la internacia E-gazetaro, sed dum la jaro 98 tiu ĉi tasko ne estis sufiĉe vigla; tamen pro la okazigo de la Kultura Festivalo oni sendis informojn pri la evento al internaciaj gazetoj, kiuj estis publikigitaj kaj aliflanke la aktiva laboro de Alberto García Fumero daŭre kontribuis al aperigo de kuba voĉo en gazeto kiel **Monato**.

**1.5.** Rilate la hejmpaĝon de KEA en Internet, daŭre estis atentata de Alberto García Fumero kaj aktualigata rilate eventojn de la jaro. Ĝi estas vizitata de esperantistoj tra la mondo kaj certe kontribuas al informado pri la ekzisto de KEA nacie kaj internacie.

## 2. NACIAJ KAJ INTERNACIAJ EVENTOJ

**2.1.** Ni okazigis plurajn naciajn eventojn: Nacian Renkontiĝon en Cienfuegos, aranĝojn omaĝe al la 19-a datreveno de KEA, Seminarion por Instruistoj, 1-an Infanan Renkontiĝon, en Guantánamo. Kiel planite efektiviĝis sukcese tiuj ĉi eventoj kiuj evidentigas la bezonon daŭre krei tian etoson kiu donas taŭgan medion por ĝui nian esperantistan kulturon kaj praktiki la lingvon.

**2.2.** Sukcese efektiviĝis la 2-a Kultura E-Festivalo en Santiago de Cuba kun partopreno de eksterlandaj samideanoj el Eŭropo kaj Usono. Ĝi konsistigis fajropruvon ĉefe por nia filio en Santiago, kiu elprovis sian kapablon organizi la eventon kaj allogi ĉirkaŭ ĝi la kulturajn kaj aliajn ŝtatajn instancojn. El tio rezultis pli forta kaj prestiĝa loka movado kaj, kompreneble,

ĝi ebligis pli bonan informan agadon surloke kaj nacie pri KEA kaj la kultura valoro de Esperanto. Aliflanke, reprezentantoj de nia Asocio partoprenis la 83-an UK-on en Francio, la ILEI-Konferencon kaj en konferenco de la esperantistaj komunistoj samlande.

**2.3.** Rilate al nia Kongreso, estas plenumita tiu ĉi tasko pretigi kondiĉojn por ĝia sukcesa efektivigo. Nuntempe ĉio estas preparita por inaŭguri la 3-an Nacian Kongreson de KEA.

### 3. DISVASTIGO TRA LA LANDO KAJ REVIGLIGO DE FILIOJ

Ni konsideras tre valoraj la atenton kaj vizitojn al filioj, ĉar pere de ili ni ĉiuj pli interkonatiĝas kaj ni, naciaj estraranoj, havas la ŝancon taksi kaj stimuli la laboron faritan kaj faratan de la esperantistoj en la diversaj filioj.

**3.1.** Cele al plenumo de tiu ĉi aspekto la Asocio starigis al si la taskon aktivigi la agadon en Villa Clara, Ciego de Avila kaj Havano. Dekomence estis taskita flanke de provinco Villa Clara, samideano José Luis Montes de Oca kiu entuziasme entreprenis la agadon kaj kunordige ni sukcesis munti ekspozicion en la urba biblioteko kaj propagandi pri E-o. Aldone, li vizitis esperantistojn en aliaj regionoj kiel Sagua La Grande. Krome, oni lanĉis informojn pri la PKK kiu bone efikis en diversaj municipoj de tiu provinco. Ĉi momente la perspektivoj montriĝas bonaj por la progreso de tiu laboro en la centra provinco Villa Clara. Tute male okazis rilate al Ciego de Avila, kie la iama aktivulo kaj aliaj esperantistoj pro personaj kialoj forlasis la urbon kaj pro laborceloj; la grupo restas disa. Malgraŭ pluraj kontaktoj kaj telefonado ne eblis konkretigi planon por revigligi la grupon tie. Rilate al Havano ankoraŭ ni agadas tiudirekte. Daŭras E-instruado en municipo Güines, kaj en Quivicán la grupo pretas aktivi. La vilaĝo estis dufoje vizitita kaj materialoj donitaj, tamen perspektivoj ne estas tro altaj. Ĝi restos en niaj taskoj por la jaro 99, tiel ke ekzistas volo de la esperantistoj plu labori kaj aktivi. La PKK restos kiel strategio por nutri la movadon en Quivicán. Aliaj regionoj de la provinco kiel Santa Cruz kaj San José restis samstate. Bedaŭrinde nur hazardajn informojn ni ricevas pri vivanteco de infana agado en Santa Cruz.

**3.2.** En la celo kreskigi kaj fortigi la movadon oni parte sukcesis rilate al Cienfuegos kaj Matanzas, filioj vizititaj dum la jaro kaj reordigitaj ties estraroj en koncernaj asembleoj; ili havas nun kompletan teamon de entuziasmaj esperantistoj. Rilate al Las Tunas, Holguín kaj Isla de la Juventud la situacio restis sama, nek kreskis nek malkreskis; tamen, menciindas la laboro de Isnel en Holguín per sia pupteatro tra la komunumo, kio iel sukcesis teni vigla la grupon tie kaj verŝajne la ebleco daŭre resti kiel organizita grupo estas reala. Oni devas de pliproksime insisti kaj serĉi variantojn por iom post iom kreskigi la movadon en tiuj regionoj. Rilate al Pinar, la movado foje rekaptis kelkajn antaŭajn homojn, sed malseriozeco denove faligis ĝin. Nuntempe la grupo estas disa, kaj ni malhavas konkretajn informojn pri ilia aktivado; do, ni insistos por regajni homojn kaj reorganizi la grupon.

### 4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO

Dum la lastaj jaroj la situacio rilate al organizado kaj interna administrado restis sufiĉe stabila, tamen ankoraŭ ne kontentiga. Ni regule devas insisti pri la bezono ke la filioj plibonigu siajn respektivajn kontrolojn de la membraro specife en la enspezo de koncernaj kotizoj, kiuj konsistigas esencan enspezofonton de la Asocio, kvankam ne la sola. Ni devas mencii ke filioj kiel Camagüey, Santo Domingo kaj Granma estis la plej akurataj tiusence, dum la ceteraj tiom faris iom pli lante kaj ofte po partoj, kio ne kontribuas al bona tutlanda organizo en tiu aspekto. Dum la jaro ni denove havis novan oficistinon kaj tiurilate denove ni reordigadas la internan ofican laboron, la dosierojn kaj dokumentujojn. Bezonatas ankoraŭ plibonigi tiun ĉi agadon kaj finaranĝi la ĝeneralan uzon de la nacia modelo por kontrolo de la membraro, la koncernajn atestilojn pri enspezo de kotizoj kaj ties kongruo kun la membrokontrolo, tiel ke oni povu pli travideble havigi al si la plej fidindan informon pri niaj membroj dum la jaro.

**4.1.** Membrokontrolo kaj kotizoj: Informoj venis regule kvankam ne ĉiam akurate. La plej elstaraj filioj tiusence estis Camagüey kaj Santo Domingo kaj sekve Granma, pli specife en la enspezo de kotizoj al la membroj. Tamen en aliaj, kiel Urbo Havano, pro manko de estraranoj, la organiza laboro estis ege malfrua dum la tuta jaro; dum Santiago, alia pli granda filio, estis ankaŭ iom malfrua. Do, bezonatas de ni ĉiuj pli konstanta agado tiudirekte.

**STATISTIKO PRI MEMBRO-KONTROLO / 1998**

| FILIO | SEMESTRO I | SEMESTRO II |
|---|---|---|
| Isla de la Juventud | - | - |
| Pinar del Río | - | - |
| Urbo Havano | 161 | 109 |
| Havano | 13 | 8 |
| Matanzas (P. B) | 12 | 12 |
| Villa Clara | 33 | 36 |
| Cienfuegos | 12 | 16 |
| S. Spíritus | 11 | 11 |
| C. de Avila | 2 | - |
| Camagüey | 178 | 143 |
| Las Tunas | 46 | - |
| Holguín | 30 | 30 |
| Granma | 71 | 85 |
| Santiago de Cuba | 91 | 156 |
| Guantánamo | 45 | 38 |
| **TOTALO** | **693** | **644** |

**4.2.** Dum la jaro la atento al filioj estis plenumata pere de diversaj rimedoj, nome vizitoj, leteroj, protokoloj kaj telefonado. Ni faris plurajn vizitojn al Santiago de Cuba, tri al Guantánamo kaj Pinar del Río, du al Cienfuegos, Villa Clara kaj Ciego de Ávila kaj po unu al Matanzas, Granma kaj Camagüey. Oni ankaŭ vizitis plurfoje la municipan filion en Quivicán. Oni planis vizitojn al Las Tunas, sed pro diversaj kialoj de la tieaj esperantistoj

tiuj vizitoj ne efektiviĝis. La kontakto kun Sancti Spíritus estis ĉefe skriba kaj telefona, same, okazis kun Holguin kaj Junulara Insulo.

**4.3.** Kontrolo kaj atento al membro-subtenantoj ne mankis dum la periodo, tamen ni konsideras ke ĉi agado perfektigendas. Ju pli ni atentos niajn subtenantojn des pli da ili ni havos, kio efikos bone al nia Asocio.

**4.4.** Atento al komitatanoj kaj flegado de la interna informa fluo estis daŭra per diversaj rimedoj: personaj kontaktoj, telefonado kaj skribado. Kiel antaŭe, ni dum la jaro ĉiam havis kontaktojn kun niaj komitatanoj per la protokoloj kaj ekstraj dokumentoj laŭbezone. Tiu ĉi estas konstanta tasko plenumenda kaj ankaŭ plibonigenda, kies celo estas ke niaj komitatanoj estu pli kaj pli konsciaj pri sia rolo en la asocia vivo kaj decidoj.

## 5. PUBLIKAJ RILATOJ

Niaj rilatoj publikaj ĝenerale stabilis dum la tuta jaro kaj oni faris plurajn kontaktojn okaze de niaj aranĝoj naciaj kaj regionaj, kio devas resti kiel principo kaj tiucele oni devas pli regule tion fari kaj poste flegi la jam faritan kontakton.

**5.1.** La rilatoj kun politikaj, registaraj kaj aliaj instancoj estis konstante flegataj nacie kaj loke far la filioj, kvankam bezonatas pli da kunlaboro farebla laŭ permanenta maniero. Kun la rilatorgano regule okazis kontaktoj, kvankam ni devas labori por ke estonte tia laboraspekto fariĝu ne nur informa de ni al ili, sed iamaniere pli kunlabora.

**5.2.** La asociaj ligoj kun kulturaj asocioj en la koncernaj lokoj evidentiĝis en tre specifaj kazoj kiel Holguín, Granma kaj Santiago de Cuba, nome per la teatra projekto komunuma prezentita de Isnel Pupo, pro la laboro kultura en komunumo kaj okaze de la Kultura Festivalo respektive. Tia agado bezonas pliajn konkretajn projektojn por vera efektiviĝo en aliaj regionoj

## 6. FINANCOJ: BILANCO 1998

| *Enspezoj:* | *Jare* |
| --- | --- |
| Kotizo | 6 911,00 |
| Libroservo | 4 600,00 |
| Aliaj servoj | 11 920,00 |
| **Totalo:** | **23 431,00** |

*Elspezoj:*

| ***Centra Oficejo*** | *Jare* |
| --- | --- |
| Riparoj diversaj | 148,38 |
| Salajro | 9 600,00 |
| Ofic. materialoj | 761,76 |
| Imposto | 4 099,50 |
| Elektro | 877,81 |
| Telefono | 1 182,56 |
| Gaso | 244,80 |
| Bankservoj | 165,00 |
| Poŝto | 398,00 |
| **Subtotalo:** | **17 477,81** |

| ***Nacia Estraro*** | *Jare* |
| --- | --- |
| Komitatkunsido | 2 423,64 |
| Eventoj | 3 100,00 |
| Estrara rezervo | 285,00 |
| Kontrolvizitoj | 720,00 |
| **Subtotalo:** | **6 528,64** |

| ***Investoj*** | *Jare* |
| --- | --- |
| Investoj por servoj | 805,34 |
| **Subtotalo:** | **805,34** |

| | | | |
|---|---|---|---|
| TOTALAJ ENSPEZOJ | 23431,00 | TOTALAJ ELSPEZOJ | 24 811,79 |

| | | |
|---|---|---|
| | KEA 31/12/97 | 16031,17 |
| (+) | TOTALAJ ENSPEZOJ | 23431,00 |
| (-) | TOTALAJ ELSPEZOJ | 24811,79 |
| | | 14650,38 |

## 7.- INSTRUA AGADO

Nia Asocio marŝas pli malpli glate, konsiderante niajn nunajn enlandajn kondiĉojn, laŭ oni povis konstati pere de diversaj rektaj kontaktoj kun estraranoj de filioj, telefonvokoj kaj ĝeneralaj informoj ricevitaj en la Centra Oficejo de la Asocio, sed bedaŭrinde, kiel kutime, ŝajnas ke ankoraŭ oni ne konscias pri la bezono de konstanta kaj sufiĉe ĝisdetala informfluo inter la koncernaj homologoj, kio permesus nin esti pli bone informitaj sisteme pri la laboro ĉies farita en tiu ĉi grava kampo de la Asocio.

**7.1** Oni povas konstati ke ankoraŭ ni devas multon fari por sukcesigi niajn regulajn kursojn tutlande eĉ en tiuj provincoj kie tradicie oni havis tre bonajn rezultojn kaj ankoraŭ multon pli por sendi ĝustatempe la kocernajn informojn tiel ke oni povu pli bone kaj pli ĝuste bildigi la realan laboron de la filioj.

**7.2** En rilato kun la perkoresponda kurso (PKK), dum la periodo oni malfermis novan alternativon kiu permesas al la interesitoj akiri la tutan kurson en du partoj aŭ, laŭvole, per unu fojo. Tiu nova ebleco estas pli malmultekosta kaj pli alloga por multaj personoj dezirantaj lerni la lingvon. Dum la Festivalo en Santiago de Cuba oni liveris la tutan lernomaterialon por tiaspeca alternativo al la diversaj filioj.

**7.3.** La provincaj seminarioj efektive ne okazis tra la lando kaj evidentiĝas ke tiusence ni devas plu labori por stimuli kaj krei la bezonatajn kondiĉojn por ties realigo; same indas profiti pli kunordigе la vizitojn de estraranoj al filioj por kunsidi kaj prepari tiajn klerigajn seminariojn aŭ simile.

**7.4.** La distanca kurso stagnas. Oni resendis aŭ liveris persone la taskojn al la interesitoj, sed la reago estas ege magra. La diversaj estraranoj enskribiĝintaj en la kurso devas konscii pri la bezono persone pliatenti ĝin por ke pliposte ili povu konsciigi kaj engaĝigi la ceterajn aktivulojn.

**7.5. Atento al ILEI-Sekcio.** Omaĝe al la Tago de la Instruisto kaj ankaŭ okaze de la nova jaro, oni sendis gratulkarton al nia tuta instruantaro, kiel modesta agnosko al la laboro sindediĉe kaj sindoneme de ili farita. En la internacia sfero, nia Kuba ILEI-Sekcio estis reprezentata pere de kvar el iliaj membroj en la 32ª ILEI-Konferenco okazinta de la 8ª ĝis la 14ª de aŭgusto 1998 en Montpellier, Francio, kie partoprenis sesdeko da esperantistoj el 24 landoj. Pere de la bulteno Saĝa Sago oni informis nian membraron pri la rezulto de tiu ĉi grava evento. Ĉijare, la Internacia Ekzamena ILEI-Komisiono rajtigis tri kubajn instruistojn kiel ekzamenantoj, kio sendube ebligas al la Asocio ekde nun prepari kondiĉojn por okazigi

internaciajn ILEI-ekzamenojn en Kubo; do, indas ke ni ekprofitu tiun konkretan eblecon por labori cele al pli preparitaj instruistoj.

**7.6.** En julio 1998, ni okazigis kun kontentiga rezulto nian jam kutiman porinstruistan seminarion kun partopreno de reprezentantoj el ok provincoj. Ĝi funkciis en la Panamerika Vilao, kie ankaŭ oni gastigis la partoprenintojn. Dum la Seminario oni prelegis, prezentis modelajn lecionojn kaj interŝanĝis spertojn. Ĉiuj ĉeestintoj esprimis siajn kriteriojn en rilato kun la Seminario, kiel kutime, pere de anonimaj enketiloj kaj feliĉe ĉiuj opinioj estis favoraj, kvankam kompreneble la kvalito de tiaspecaj eventoj plibonigendas.

## 8. KULTURAJ KAJ KLERIGAJ ARANĜOJ

**8.1.** Konstante ni klopodas pli kaj pli levi la konscion de nia membraro pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado profitante la diversajn E-aranĝojn por priparoli tiujn temojn, okazigi konkursojn kaj krei la etoson taŭgan en niaj renkontiĝoj kaj eventoj por pli altigi la kulturan nivelon de niaj aktivecoj. Kompreneble ni ne povas taksi ĝin vere bona, tamen kontentiga kaj plibonigenda.

**8.2.** Dum la jaro oni flegis konstante la kulturan aktivadon de la filioj kaj regule provizis ilin per diversaj materialoj taŭgaj por riĉigi La Kulturajn eblecojn, artajn prezentojn kaj aliajn. Tiurilate, la estiĝo de Lingvistika Komisiono por reviziado de materialoj prezentotaj publike en niaj aranĝoj donas pli altnivelan kvaliton al la esperantista kulturo nialande. Specife okaze de la Kultura Festivalo ĝi bone funkciis, kvankam estonte ĝi devos pli kaj pli roli tutlande. Konstanta tasko de Kulturo estas la monataj aranĝoj en la diversaj provincoj, ankaŭ en la Nacia Sidejo: en aliaj provincoj oni aranĝas aktivecojn ĉefe en kulturdomoj kaj en la komunuma domo. Grava momento de nia kultura agado estis la partopreno de Julián Hernández, Georgina Almanza kaj Alexis Otero en la Arta Vespero de la UK en Montpeliero per deklamado, kaj kantado, kaj ankaŭ Jorge L. Santillán kantis dum diversaj momentoj de la programo.

**8.3.** Pri atento de artistoj esperantistaj ni konsideras ĝin pli bona kaj ĉefe ekde lingva vidpunkto. Ankoraŭ estas plibonigenda rilate la malmultajn profesiajn artistojn kiuj kunlaboras kun la Asocio, ĉar tio garantios pli altnivelajn kulturajn prezentojn. Rilate al varbado de novaj, la agado ne estis regula, tamen, pro la Kultura Festivalo en diversaj regionoj multe pliboniĝis la rilatoj kun artistoj amatoraj kaj profesiaj, kelkaj el ili novaj en la movado. En Santiago de Cuba kaj Guantánamo evidentiĝis tre bonaj perspektivoj tiurilate. Aliflanke en Granma multe progresis la kultura agado kaj tio same montriĝis dum la Festivalo. Same la kultura projekto de Isnel Pupo, en Holguín, kiu kreis la unuan kuban esperantistan pupteatron (Bona Amiko), prezentiĝas al ĝenerala publiko en sia teritorio, kaj jam estas ligita al la kultura vivo de la urbo. Nun ili havas novajn artistojn esperantistojn, kiuj devas esti flegataj konstante de niaj estraranoj pri Kulturo tutlande.

**8.4.** Dum 1998 nia kultura fako ne emfazis sian agadon en la bezonata reprezentiĝo de KEA en eksterasociaj kulturklerigaj eventoj, kiel necesa konstanta laboro, tiel ke ĝi kontribuos pli altigi la prestiĝon de la Asocio kaj Esperanto kiel lingvo, kio devas esti aktiva parto de niaj taskoj.

**8.5.** Rilate al bibliotekaj servoj oni devas diri ke la sideja bilioteko dum la jaro estis konstante prizorgata de nia estrarano Juan Ramón Rodríguez; tiusence estis preparata komputila kontrolo por pruntedonoj pli efika ol antaŭaj ĉar oni povis enmeti pliajn detalojn koncerne al la libroj kaj ties redono. Krome, oni inventaris ĉiujn gazetojn ekzistantajn en la biblioteko per detala datumaro same per komputilo. Danke al kontribuo de samideano Eddy Raats (el Belgio) dum la jaro kelkaj filiaj bibliotekoj pliriĉigis siajn stokojn. Tiu ĉi laboro devas esti konstanta kaj ni esperas ke iom post iom la biblioteka servo fariĝu pli kvalita, kio ankaŭ dependas de nia kapablo stimuli la esperantistojn pli legi.

**8.6.** Dum la restado de esperantistoj en kampadejoj kaj regionaj renkontiĝoj oni multe profitis la okazon montri kaj eksterigi nian kulturon, tiel multaj ne esperantistoj konas pri la agado de nia Asocio. Okaze de la 19-a datreveno de KEA oni aranĝis kulturajn renkontiĝojn naciskale kaj la centra aranĝo okazis en la Domo de la Kuiristoj kun partopreno de Cecilia Infante, direktorino de la eldonejo José Martí. Dum la jaro, la partopreno de la esperantistoj estis pli aktiva ol pasintan jaron ĉar multaj kamaradoj aktive agis, legante poemojn, kantante; tiel oni pliriĉigis la enhavon de la programo; en multaj el ili partoprenis eksterlandaj vizitantoj. Do, la kulturaj eventoj estis farataj laŭplane kaj tiusence ni devas ankoraŭ pli insisti en la kvalita preparo de la kulturaj eroj en ĉiuj regionaj renkontiĝoj, tiel ke ili fariĝu veraj kulturaj momentoj per kiuj la esperantistoj pli konatiĝu kun la esperantista kulturo.

**8.7.** La plej grava kultura aktiveco en KEA en 1998 estis la 2-a Kuba Kultura E-Festivalo okazinta en Santiago de Cuba dum novembro, kiun partoprenis pli ol 120 geesperantistoj el preskaŭ ĉiuj provincoj de la lando. Oni organizis tre riĉenhavan deklamkonkurson, prelegojn, rondan tablon kun partopreno de du elstaraj esperantistoj eksterlandaj, nome Eddy Raats kaj Alex Humet, el Belgio; ekspoziciojn kaj aranĝojn en UNEAC, teatraĵojn kaj promenojn tra la urbo. Tiucele la kultura fako de KEA rekte atentis la preparlaborojn, kontrolis la lingvan enhavon kaj zorgis pri la sukcesa arta prezento de la evento. Indas elstarigi ke la esperantistoj en Santiago multe zorgis tiun aspekton kaj laboris por la sukcesa brilo de la evento.

## 9. INTERNACIAJ RILATOJ

**9.1.** Dum la jaro niaj rilatoj estis konstantaj kaj regulaj kun diversaj landaj kaj regionaj E-asocioj, UEA, ILEI kaj Latinamerikaj landaj asocioj el Kolombio kaj Meksikio. Same kun diversaj eŭropaj esperantistoj; en reprezento de Flandra E-Asocio, nome Eddy Raat, kiu aktive kunlaboris dum la jaro rilate al kunportado de libroj kaj aktiva partopreno en nia Festivalo. Same venis la kontribuo de usona esperantisto Paŭl Lynch kiu kunportis medikamentojn disdonitajn inter la filioj por la esperantistaro laŭbezone. Per la aktiva partopreno dum la UK-o en Francio estis farataj kontaktoj kun diversaj organizaĵoj, kiel la Kolektivo de Komunistoj, UEA, la Amerika Komisiono de UEA kaj kun elstaraj esperantistoj kaj amikoj de Kubo.

**9.2.** Oni daŭre esprimis la pretecon konkretigi kunlaboron kun Meksika E-federacio, sed tio ne konkretiĝis; aliflanke ni sukcesis garantii nian reprezentanton en la 4-a Tutamerika Kongreso okazinta en Kolombio kaj tiusence ni petis la sidejon por venonta TAKE, eventuale

la 6-a; tiamaniere ni celas pli kaj pli aktivigi nian rolon en la regiono por plifortigi la movadon en Latinameriko. Aliflanke, ni devas reguligi la kontakton kun la komisiono en la laboro por komuna informilo.

## 10. FAKA AGADO

**10.1.** Tiu ĉi estas konstanta agado kiun nia komisiito pri tio devas atenti kaj klopodi provizi la interesitojn pri argumenta bazo. Ĝia efektiviĝo devas esti pli regula kaj instiga cele al vera utiligo de la lingvo flanke de la esperantistoj.

**10.2.** Ni konsideras ke pri daŭra informado al la esperantistoj pri apliko de E-o ne estis sukcesa dum la jaro kaj tiucele oni devas periode utiligi la diversajn asociajn informilojn.

**10.3.** Kiel rezulto de ne bona informado en tiu ĉi direkto, mankas stimulado al fakuloj por utiligo de E-o en scienco kaj tekniko. Ni konscias pri la graveco pli kaj pli montri la utilecon de la lingvo kaj stimuli ties uzon, tamen, ni devas daŭre serĉi pli taŭgajn formojn por tion plenumi laŭlonge de la Insulo.

**10.4.** Oni planis la efektivigon de renkontiĝo inter medicinistoj, kio ne efektiviĝis pro manko de vera reago kaj laboro flanke de la medicinistoj. Kiel sciate oni devas unue pli konsciigi niajn fakulojn regi la lingvon kaj plu studi ĝin por vera utiligo en siaj koncernaj fakoj; tamen, tio ĝis nun ne estis sukcesa.

## 11. LIBROSERVO

**11.1.** Konstante ni agadis por kreskigi la stokon de materialoj por nia libroservo kaj ni konsideras ke ĝi estis sukcesa tial ke estis plenumita la buĝeto rilate enspezojn pro tiu ĉi koncepto. Tamen, ni ne kontentiĝas tiusence, ĉar ni devas krei veran stokon por tuta jaro kaj reguligi nian oferton rilate librojn, gazetojn kaj aliajn esperantaĵojn.

**11.2.** La libroserva funkciado estis pli bona dum 1998 tra la tuta lando kaj ni profitis ĉiujn eventojn por oferti tian servon; tamen, mankas atingi nivelon de vera libroservejo kiu devas konstante funkcii en ĉiuj aranĝoj kaj en nia sidejo kun ĉiam pli bona oferto. Multaj obstakloj materiaj kaj financaj malhelpas tian atingon, sed ni devas alstrebi pli regule al tia celo.

## 12. TURISMA AGADO

La jaro 98 markis ekiron de la porturisma agado tutlande per vigla laboro kaj diskonigo de landaj turismejoj kaj insulaj vidindaĵoj pere de Esperanto. La agadon de la turisma komisiito Marta Alonso estis tre serioza kaj konstanta dum la periodo.

**12.1.** Dum la jaro estis ricevataj kaj atentataj kelkaj vizitantoj, kelkaj venintaj al la Festivalo en Santiago de Cuba. Dum majo, Anja kaj Hejdi, el Belgio; en julio, Jean Claŭde kaj Dominique, el Francio; novembre, Paŭl Lynch (Usono), Kornelia Raats (Belgio), Jon Eliasson (Islando).

Ankaŭ estis nerekte prizorgataj aliaj kubaj amikoj, kiaj Eddy Raats (Belgio), Francisca Reisel (Germanio), Kim Andersen (Danlando), Alex Humet (Belgio). Krom tio oni interretis kun organizaĵoj tra la tuta mondo kaj multaj interesitoj scias pri la lando. El eksterlande rimarkindas la kontribuo de S-ro Eddy Raats kiu multe helpis kaj helpas la Asocion kaj speciale la porturisman laboron de la grupo. La turismaj lokoj preferitaj de niaj vizitantoj dum la pasinta jaro estis: Santiago de Cuba, Guantánamo (Baracoa), Sancti Spiritus (Trinidad), Pinar del Río (Viñales) kaj Urbo Havano.

**12.2.** Dum 1998 nia agado koncentriĝis en kreado de reto preskaŭ tutlanda por labori cele al plifortigo de turismo esperantista. Jam ekzistas reprezentantoj en la diversaj provincoj kaj ili laboras tre serioze kaj tre ageme. En ĉiu evento de KEA la turisma grupo profitis la okazon renkontiĝi por analizi la turisman agadon kaj glatigi laboron en tiu senco. Ankaŭ per ĝi oni konis la situaciojn konkretajn en la diversaj provincoj. Omaĝe al la unua datreveno de la turisma grupo ni ekeldonis bultenon, kiu aperos kvar foje jare (en marto, junio, septembro kaj decembro). Ĝi enhavas la novaĵojn okazintajn kaj diversajn priturismajn aferojn. Ankaŭ ni sendas la bultenon lande al la aktivuloj pri turismo, al prezidantoj de filioj, al honoraj membroj de KEA, kaj estraranoj. Eksterlande, al diversaj organizaĵoj fakaj kaj gravuloj. Ankaŭ kun financa helpo de KEA ni eldonis faldfolion por disdoni eksterlande. Jam en la UK en Francio ĝi estis disdonata kiel formo propagandi la landon, cele al diversaj eventoj esperantistaj kiel la Festivalo kaj la Kongreso, interalie. KEA-komisiito pri Turismo sukcesis stimuli aktivulojn tra la lando pere de diplomo okaze de la unua datreveno de la turisma grupo, la 21-an de septembro 1998. Tutlande la Komisiito pri Turismo kontaktas regule la provincajn reprezentantojn kaj ankaŭ pretigas la homojn pere de seminarioj, prelegoj pri ĝenerala kulturo, kuba historio, esperantista kulturo kaj trairoj al vizitindaj lokoj, surbaze de antaŭ prilaboritaj materialoj tradukitaj de la koncernaj aktivuloj, zorgeme reviziitaj kaj analizitaj, por serioza preparado de la esperantistoj kiel indaj ĉiĉeronoj de kiu ajn vizitanto. Ni konsideras ke la turisma fako de KEA estis kontentige progresanta dum la jaro 1998 kaj celas pliampleksigi tiun laboron kaj konsciigi la esperantistojn pri la utileco de Esperanto en tiu ĉi kampo, samtempe kontribui al pli klerigo de niaj samideanoj kaj diskonigi la kuban realon. Kompreneble, indas atenti ke antaŭ ĉio oni estas esperantisto kaj tia sinteno devas esti konstanta standardo de niaj aktivuloj tutlande.

## 13. TRA LA FILIOJ

**13.1.** Guantánamo: Dum la jaro la filio laboris kun novaj lernantoj ĉefe en la dua semestro kiu estis pli stabila. Oni regule kunsidis, kvankam protokoloj ne regule iris al Nacia Estraro. Tamem la komunikado estis bona per telefono aŭ per la bulteno **La Famo**. Krome, reprezentantoj de la Nacia Estraro vizitis la provincon kaj inverse. Rilate al la membraro ĝi estis iom pli alta dum la unua semestro pro tio ke kelkaj komencintoj ne plu daŭrigis. Entute ni havas du membro-subtenantojn. Rilate al Informado, la agado iomete pliboniĝis. La eldonado de **La Famo** okazadis regule, kvankam la kvanto ne sufiĉas ankoraŭ kaj same okazas kun **Almiki**, suplemento de **La Famo** en la hispana lingvo, por la lokaj instancoj. Dum la jaro funkciis regulaj kursoj de la unua kaj dua niveloj; dum la unua semestro finis kursojn entute 9 personoj kaj en la dua entute 15; ankaŭ aliĝis 7 personoj al la PKK. Oni

intencas reorganizi la Distancan Kurson, kaj laboras kun entute 16 infanoj en du grupoj. La rilatojn publikajn oni konsideras bonaj kun la diversaj lokaj organizoj, kulturo kaj aliaj. Per la agado de Eddy Raats kaj Alex Humet, el Belgio, la provinca hospitalo ricevis medikamentojn; la filio ricevis instrumaterialojn kaj librojn. Ekde kultura vidpunkto la movado kreskis. Plifortiĝis la agado per muzikgrupo Anĝeloj, kiu faris tre bonan laboron kaj bone reprezentis la provincon en la Kultura Festivalo en Santiago de Cuba, partoprenis la kulturan spektaklon en la Unua Infana Renkontiĝo okazinta en la provinco, koncertis por la komunumo kaj en la teatro Actualidades, kio bone reprezentis la Asocion ekster la movado. Krome, oni laboras kun muzika triopo kiu reprezentos la Asocion en internacia festivalo okazonta en la provinco.

**13.2.** Camagüey: Oni daŭre kaj serioze agadis en la diversaj taskoj. Pri oganizo nia filio pliprogresis, kaj laboris en la celoj de Kampanjo 2000 por disvastigo kaj utiligo de Esperanto. Oni regule kontaktis kun MINJUS kaj MINCULT kaj ankaŭ kun la Iberamerika Domo. Ni regule kunsidis kaj sendis protokolojn al Nacia Estraro kaj daŭre kontrolis la plenumon de interkonsentoj. Nia membraro estis pli alta en la unua semestro. La PF daŭre organizis kulturajn aranĝojn kie la esperantistoj renkontiĝis por praktiki la lingvon kaj ĝui kulturajn momentojn kun kantoj, deklamado, ktp. Okaze de Zamenhofa tago, oni organizis kulturajn aranĝojn en la lernejo Fernando Ortiz; la filio partoprenis en la Nacia Renkontiĝo en Cienfuegos kaj en la Kultura Festivalo en Santiago. La filio akceptis belgajn esperantistojn kaj tiucele preparis kulturan programon. Cetere, la prezidanto de la filio partoprenis la UK-on en Francio kaj tie kontribuis en la kulturaj momentoj nome de nia lando. La publikaj rilatoj estis pli aktivaj kompare al antaŭaj jaroj, kaj oni regule kontaktis kun la diversaj instancoj kaj plifortigis la rilatojn kun Ministerio pri Edukado, Justico kaj aliaj. Ni daŭrigis la disvastigon per **Radio Cadena Agramonte** kaj komencis kurson perradian ĉiusemajne. Oni publikigis diversajn artikolojn en la provinca ĵurnalo **Adelante** kaj eldonis la unuan parton de kronologia resumo pri la movado en Camagüey, kiu ricevis premion en la konkurso pri historio de KEA. La lernejo regule funkciis kaj oni laboris en plibonigo de la instruado, atentis la PKK-n kaj malfermis kurson por infanoj en la Iberamerika Centro.

**13.3.** Villa Clara: Dum la jaro reviglîĝis la agado en tiu filio per laboro de José Luis Montes Oca, delegito de KEA por tia celo dum la pasinta Komitatkunsido. Okazis kunlaboro kun Cienfuegos, renkontiĝoj en Santo Domingo, kaj oni partoprenis en E-renkontiĝo en Urbo Havano, en laborkomisiono de la centra regiono en Cienfuegos kaj sekve en la Nacia Renkontiĝo same en Cienfuegos. Per la agado de esperantistoj en Santo Domingo, oni muntis ekspozicion en Santa Clara por varbi interesitojn, kaj propagandis en aliaj municipoj, kiel Placetas kaj Sagua la Grande, cele al varbado de novaj membroj por PKK, kio tre bone efikis. Oni partoprenis la Kulturan Festivalon en Santiago, kvankam la provinco ne kunportis reprezentadon kulturan, malfermis kurson en Santa Clara, kaj diskonigis Esperanton per la provinca radiostacio kaj ankaŭ per televido de la provinco. Dum la jaro oni eldonis la bultenon **Verda Lumo**, kiun oni sendas en kaj eksterlanden. La provinco estis vizitata de la baptopatro, Alberto Rodriguez, kaj protokoloj de la kunsidoj estis regule senditaj al Nacia Estraro. La membraro daŭre stabilis, kvankam nun kun novaj membroj de PKK la tendenco estas al pliiĝo.

# ĈEFAJ TASKOJ DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO POR 1999

## 1. INFORMADO

**1.1.** Regula informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA, pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj, kaj per aliaj rimedoj, kun emfazo en la grafikaj, tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciiĝu pri nia agado.

**1.2.** Konsciigu la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E-o en sia medio por varbi novajn membrojn kaj amikojn de E-o.

**1.3.** Garantii la eldonon de la organo **Avanco** (3-foje jare), **La Noktuo** (4-foje), **Universo** (6-foje) kaj aliaj filiaj bultenoj kaj ties distribuon al enlandaj kaj eksterlandaj amaskomunikiloj kaj institucioj.

**1.4.** Ebligi regulan aperon de KEA en la internacia E-gazetaro.

**1.5.** Atenti la oficialan hejmpaĝon de KEA kaj regule ĝisdatigi la informojn.

## 2. NACIAJ KAJ INTERNACIAJ EVENTOJ

**2.1.** Garantii la filioj kulturan programon omaĝe al la 20-a datreveno de KEA.

**2.2.** Okazigi Nacian Renkontiĝon en Camagüey.

**2.3.** Okazigi Nacian Seminarion pri Instruado kaj Informado en Granma.

**2.4.** Atenti la okazigon de IKEK Konferenco en Urbo Havano en decembro 1999.

## 3. DISVASTIGO TRA LA LANDO KAJ REVIGLIGO DE FILIOJ

**3.1.** Labori por reviglígi la movadon en tiuj teritorioj kun jura personeco: Villa Clara kaj Havano.

**3.2.** Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Matanzas, Las Tunas, Holguin, Cienfuegos, Pinar del Río kaj Isla de la Juventud.

## 4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO

**4.1.** Membro-kontrolo kaj kotizo.

**4.2.** Atento kaj vizitoj al filioj.

**4.3.** Kontrolo kaj atento al membroj-subtenantoj.

**4.4.** Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon.

## 5. PUBLIKAJ RILATOJ

**5.1.** Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo; daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano. Kunlabori kun tiaj instancoj laŭeble.

**5.2.** Ligi la Asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko kaj levi la influon en la komunumo.

**5.3.** Rilati al aliaj asocioj kulturklerigaj, UNESCO kaj UNO-Asocio; laŭeble iniciati konkretan kunlaboron.

## 6. FINANCOJ

**6.1.** Flegi la internan administradon de KEA-sidejoj.

**6.2.** Fiksi strategion por plenumi efike la buĝeton de la nacia banko, BFI kaj PF-kontoj.

**6.3.** Aktivigi Financan Komisionon por regula inspektado je ĉiuj instancoj asociaj.

**6.4.** Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.

## 7. INSTRUADO

**7.1.** Regulaj kursoj.

**7.2.** Kreskigi la PKK-n kaj daŭre atenti ties partoprenantojn diversmaniere.

**7.3.** Okazigi provincajn seminariojn por altigi la lingvan kaj kulturan scipovon de aktivuloj rilate al E-o.

**7.4.** Ekspluati kaj profiti ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de nia membraro: Distanca Kurso, konkursoj, prelegoj, ktp.

**7.5.** Atento al ILEI-Sekcio kaj al ties respondeculoj en la diversaj filioj.

**7.6.** Nacia Seminario por Instruistoj.

## 8. KULTURAJ KAJ KLERIGAJ ARANĜOJ

**8.1.** Konsciigi la membraron pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj.

**8.2.** Flegi la kulturan aktivadon de la filioj kaj provizi ilin per taŭgaj materialoj tiucele.

8.3. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn.

8.4. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj kaj komunumaj.

8.5. Zorgi pri korekta utiligo de bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj kaj ebligi tiajn servojn en tiuj teritorioj kie ankoraŭ ne estas.

8.6. Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn.

8.7. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo omaĝe al la 20-a datreveno de KEA.

## 9. INTERNACIAJ RILATOJ

9.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI, Germana E-Asocio kaj aliaj landaj asocioj, lokaj kluboj, kaj aliaj E-institucioj.

9.2. Daŭra kontribuo al evoluo de E-o en Latinameriko kaj aktive kunlabori kun la regiona informilo.

## 10. FAKA AGADO

10.1. Atento al interesitoj pri faka agado tutlande.

10.2. Daŭre informi al la membraro pri apliko de E-o en scienco kaj tekniko enlande kaj eksterlande.

10.3. Kontroli kaj stimuli fakulojn al utiligo de E-o en scienco kaj tekniko.

10.4. Flegi la agadon de KEMA.

## 11. LIBROSERVO

11.1. Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la libroservo.

11.2. Zorgi pri la korekta kaj efika funkciado de la libroserva sistemo tutlande.

## 12. ATENTO AL ALILANDAJ ESPERANTISTOJ

12.1. Atento al interesitoj viziti Kubon kaj reagi al tiaspecaj informpetoj.

12.2. Pretigi lokajn esperantistojn ekde informa vidpunkto por atenti alilandajn esperantistojn.

## Malgraŭ ĉio, KEA reprezentita en TAKE...

S-ro Juan Ramón Rodríguez (membro de la UEA-Komisiono pri Ameriko), tiama respondeculo pri Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj, partoprenis la Kvaran Tutamerikan Kongreson de E-o okazinta en Bogoto, Kolombio, de la 27-a de januaro ĝis la 3-a de februaro kun la ĉefa temo "Esperanto kaj la Tria Jarmilo". Dum prelego, li bildigis la movadon en Kubo dum la jaro 1998 kaj parolis pri la KEAj celoj post ĝia 20-a datreveno en direkto al la 21-a jarcento. Poste li havis kontaktojn kun esperantistoj en Armenio, Kalio, Medelino kaj Bogoto.

## De Usono al Kubo

Antaŭ kelkaj monatoj, Bill Maxey -usona membro de la Amerika Komisiono- kunvokis siajn infanajn gelernantojn pentri la flagojn de ĉiuj landoj de nia kontinento. Rezulto de tio estas tiu ĉi pentraĵo kiun ni publikigas hodiaŭ. Bedaŭrinde, ĝi nur aperas blanke kaj nigre, ne kiel originale (trikolora). Bill transdonis ĝin en Bogoto al Juan Ramón.



# SAEST 2000

**Cirkulero 1** **marto 1999**

## Kuba Esperanto-Asocio

***Per la sciencoj al esperanto... per esperanto al la sciencoj!***

Ni alvokas al **SAEST*2000***, la Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, kiun oni provizore proponas okazigi dum du tagoj **en la monato majo, 2000.**

## SAEST *2000* SESIOS PER:

| | |
|---|---|
| 1 | Prelegoj |
| 2 | Afiŝoj |
| 3 | Rondtablaj kunsidoj |

Ĉiu prelegonto disponos je 20 minutoj.

## Temaro de la Seminario:

- ❑ Apliko de Esperanto en ĉiuj sciencaj kaj teknikaj branĉoj.
- ❑ Spertoj kaj esploroj rilate al la instruado de la Lingvo Internacia.
- ❑ Spertoj kaj esploroj rilate al la denaska dulingveco.
- ❑ Esperanto en Medicino kaj Medicino en Esperanto
- ❑ Sciencaj kaj Teknikaj prelegoj en la Internacia Lingvo.

Tondu kaj enmetu en la koverton

**JES, MI PARTOPRENOS LA SEMINARION SAEST *2000*!**

FAMILIAJ NOMOJ ______________________________

PERSONAJ NOMOJ ______________________________

PROFESIO/FAKO ______________________________

______________________________

PRIVATA ADRESO

______________________________

______________________________

______________________________

## Kiel aliĝi?

Interesitoj bonvolu plenigi kaj sendi la kuponon kune kun resumo de la prelego antaŭ la 30-an de decembro, 1999. La prelegon mem oni sendu antaŭ la 30-an de marto 2000. Ĝin oni povas sendi tajpita (sur paperfolio je grando 8.5" X 11") aŭ en komputildiskedo.

Aliĝokotizo por eksterlandanoj estos $50.00 USD. Tamen, estonte ni informos pri oferto inkluzivante kotizon por tutsemajna restado kun matenmanĝo kaj kroma manĝo. Limdato: la 30-an de marto 2000.

## Kien sendi la resumojn?

Prelegojn kaj resumojn oni sendu al:

Kuba Esperanto-Asocio
Scienc-Teknika Sekcio
Vista Alegre 264
entre J. B. Zayas y Luz Caballero.
La Habana, 10 500, Cuba

aŭ pli simpla:

Kuba Esperanto-Asocio
Ap. 5120, La Habana, 10 500, Cuba

## Mi partoprenos per:

❑ *Prelego* ❑ *Afiŝo* ❑ *Ĉeesto*

**Titolo de la prelego aŭ afiŝo:**

________________________________________

________________________________________

________________________________________

________________________________________

________________________________________

**Mi bezonos** (elektu per krucoto):

❑ Projekciilon por lumbildoj
❑ Videoaparaton
❑ Retroprojekciilon
❑ Aliajn ilojn (Bv. klarigi!)


Ciferecigis: Javier Ramos @Radioamatoro